

Suna eklipso 1999 08 11

La 11-an de aŭgusto 1999 okazis suna eklipso, kiu estis videbla en tuta Eŭropo kaj grandaj partoj de Afriko kaj Azio. Ĝi estis plena en Eŭropo en strio de larĝo de proksimume 110 kilometroj, komencanta en Kornvalo kaj daŭriganta en norda Francio, suda Germanio, Aŭstrio, Hungario, Rumanio kaj norda Bulgario. Poste la luna ombro transsaltis al Turkio, Irano kaj Hindio. La plena fazo daŭris maksimume 2 minutojn kaj 23 sekundojn. Laŭlonge de la plena zono en Eŭropo la risko de nuboj statistike dirite estis minimuma ĉe la bordo de la Nigra Maro. Turkio kaj Irano havis eĉ malpli da nuba risko.

Mi vidis la eklipson kiel plenan en Albena ĉe la bulgara marbordo. Neniu nubo estis videbla dum la tuta tago. Tamen troviĝis certa brumeto en la aero.

Mi estis en Albena kun Marianne. Aliaj alveturintoj estis mia filo Dan, lia edzino Ingela, ilia filino Klara (du-kaj-duon-jara), Gunnel kaj Sven Georg (la gepatroj de Ingela) kaj Sabira (filino de Marianne) kaj ties amiko Aleksandăr. Dan estas esplor-asistento ĉe la Reĝa Sveda Scienca Akademio sed ne estis tie en profesia ekspedicio. Ni ĉiuj staris sur la teraso de Hotel Tervel, 60 metrojn for de la strando.

En Albena la plena fazo daŭris 1 minuton kaj 49 sekundojn. Ĝi estis neforgesebla spektaklo. Mi estas vidinta multegajn fotojn de plenaj suneklipsoj, sed neniu bildo povas juste redoni tiun ĉi miregindan naturfenomenon.

Kiam la lumo rapide malfortiĝis, jubilis miloj da personoj sur la strando.

Mia unua impresado de la plena fazo estis... nerealeco! Nigra luno troviĝis meze de la suna lumo, kiu estis pli forta ol mi estis imaginta. Oni ricevis klaran impreson de la tridimensieco de la suna sistemo, kie Venuso videblis maldekstre kaj malsupre de la suno, kaj ŝajnis esti pli proksima al ni ol tiu ĉi. La protuberancoj estis forte brilantaj. La kontrasto inter la nigra luno kaj la ĉirkaŭanta malhelblua ĉielo kaj inter ili la ruĝaj protuberancoj kaj la flave lumanta gaso ĉirkaŭ la suno estis fantazia, kaj la kombino de koloroj kaj de ege malsamaj brilfortoj mirinde bela. La korono pli fore de la suno, male, ne estis videbla, supozeble pro la menciita brumeto.

Oni ricevas fortan senton pri tiu dominanta povo en la planeda sistemo kiu estas la suno, kiam oni vidas tiun ĉi kovrata. Ĝia elradiado sentiĝas tre distinge. Ĝi stiras la planedojn kaj banas ilin en sia lumo.

Aparte menciinde estas ke mi povis vidi la preparolatajn flugantajn ombrojn dum kelkaj sekundoj, ĝuste je la fino de la plena fazo. Ili vibris kontraŭ la helaj planko kaj muro de la hotela teraso. Ili havis ondolongon de eble 15 cm. La kontrasto inter malhelo kaj helo estis tre malforta. Oni facile komprenas ke (kredeble) neniu ĝis nun sukcesis foti ilin.

La homoj sur la strando aplaŭdis kiam revenis la lumo. Mia sola kritiko estis ke la plena fazo estis tro mallonga. "Ne! Ni volas havi pli!", mi ekriis kiam revenis la suno.

Pli fruaj eklipsoj

Tiu ĉi plena eklipso estis la unua sukcesa provo el tri. Mia unua eklipso okazis 1945 07 09, kaj mi vidis ĝin kiel partan en Upplands Väsby iom norde de Stokholmo (ĝi estis plena en norda Svedio). Du fojojn mi vojaĝis por vidi plenajn suneklipsojn:

1954 06 30 mi estis sur la insulo Öland en la suda Svedio; 1990 07 22 mi estis en Joensuu, Finnlando. Ambaŭ fojoj estis nube, kvankam mi povis vidi tre malfortan ringon ĉirkaŭ la suno en 1954. Tial mi simple ne sciis kiom fabele bela povas esti plena suneklipso sen nuboj. Mi estus devinta fari pli da klopodoj por vojaĝi al iuj de tiuj kiuj jam okazis!

...kaj venontaj

Okazos neniu plena suneklipso venontjare; male unu 2001 06 21 kun pleneco en Angolo, Mozambiko kaj Madagaskaro. Kaj poste 2002 12 04 en suda Afriko kaj 2006 03 29 en Turkio.

Ĉu iu alia el la adresitoj vidis la plenan eklipson? Estus interese kompari.

Plej kore

Christer Kiselman